

## Maria Nazaré Laroça (Brazilo)



### Aspiro

Flugilas brakoj,  
kaj al ni ebligas flugi  
per la vorto skriba  
sur paperfolio.

Estas mi nura birdeto  
per rompita amflugilo  
kreante mian ĉielon.

*Juiz de Fora, 24/09/2022.*

## Moissey Bronshteyn (Rusio)



En inkandesko de la tago staris ni, kaj  
desupre sekvis kelkjarmlan ritan agon.  
Enkarniĝintaj el paseo kaj unikaj  
la judoj staris ĉe la muro por la vag' en

la universa for', alparolante Dion  
kaj balancante grizajn kapojn monotone.  
Kaj ekmeditis mi, ĉu Li neglektas tion,  
aŭ Li aŭskultas, tamen ne plu aŭdas bone,

ĉar al la preĝoj el la universa disto  
silento venis nur, sen ago reciproka.  
Kaj milde pensis mi pri orekuracisto –  
por venu pac' – ne en la mond', almenaŭ  
loka...

\*\*

Fascina festo – viv' entrajne,  
kelkhora kalma radklakado,  
mi tute ne enuas kaj ne  
enuas mia kamarado,

la suno glimas transfenestre,  
kun verdaj kronoj, blankaj trunkoj  
betuloj preterkuras feste,  
ja ankaŭ ili ĝojas nun, kaj

frizaĵon verdan taŭzas vento,  
fantomas flug' de l'tempo fajna,  
premanta horojn en momento  
de ĝoje ĝua viv' entrajna.

\*\*

Folioj falas, bomboj falas –

## Ángel Arquillos (Hispanio)



### Ĉio bluas

Vidu kiel bluas la ĉielo.  
Nuboj blankaj ne plu estas  
kaj la reĝa suno brilas  
kaj la tempesto forestas.  
Vidu, kara, kiel belas  
la horizonta linio  
kaj la senfina mistero  
de la nevidebla dio.  
Vidu la boaton liliputan  
alvenanta, ĝojplena  
kun ĥimeraj pasaĝeroj  
sur la blua mar' serena.  
Viaj okuloj bluas  
kiel la bluo ĉiela  
kiel ĉi blua rakonto  
kaj la dio nevidebla.

ja la faladoj ne egalas:  
l'unua estas nur kutimo,  
la dua estas kruda krimo.

La agon damne mi aprecas,  
ĉar ankaŭ mi kunrespondecas,  
se bomboj falas por perturbo  
de l'viv' en mia naskiĝurbo...

Estante ekstereklezia,  
mi tenas Lin en koro mia,  
kaj mire mi demandas dion,  
por kio Li permesas tion?

\*\*

Ni pli precize determinu la nociojn,  
ne plu kredante al trudata opini'.  
Serĉante trajtojn, kiuj markas la naziojn,  
vi trovas, ke al tiuj nun similas mi.

Eksplodas mia kor' pro tiu ĉi konkludo,  
ja antaŭ okdek jaroj alveninte la nazi'  
mortigus min senkulpan, ĉar mi estas judo,  
do kial nun l' bestaĉan nomon prenu mi?!

Kaj, kolektinte en la buŝo la salivon,  
sen kaŝa plan' pri ia pred', pri ia gajn'  
mi kraĉu nepre en muzelon ĉiun ajn,  
kiu devigas min primeditadi tion.

### Rita Mkrtĉjan (Armenio)



Interparolo kum aŭtuno

Brakumu min, la aŭtuno,  
Ni ofte iĝas tre malfortaj,  
Vi kantu vian tristan kanton  
Kaj diru poezian vorton.

Vi ploru per la pluv' abunda  
Vi krii per la brua vento,  
Anim' vundita vin alvokas  
Vi kvietigu miajn sentojn.

Sur vangoj – via frosta spiro,  
Aromo de sopiraj floroj,  
Brakumu min, la aŭtuno,  
Ne lasu en soleco koron.

Kiel amiko el juneco  
Vi fremda estas kaj la sama  
Vi helpu min, la aŭtuno  
Espero lasta, lasta amo.

### Klaus Friese (Germanio)



Kial?

Pli kaj pli da homoj  
havas nun tatuojn  
Strangaj bildoj, ne nur floroj.  
Kial malbeliĝo nur?  
Ĝi ofendas la okulojn.

Malbeleĉ' min ĝenas.  
Mi ne ŝatas tion.  
Eĉ la muŝo, kiu venas  
senintence el natur',  
estas por mi nur fripon'.

Malfruiĝas buso.  
Longe mi atendas.  
Ĝojo pro la tempa pluso  
mankas pro la konsekvenĉ'.  
Kial? Kial? Ĉiu plendas.

Ĝustatempe esti,  
tio ne plu eblas.  
Ĉe haltejo devas resti  
ĉiu por la rekompenc',  
se la buso vere venas.

Sed la suno brilas.  
Belas la vetero.  
Kial vi malmulte miras  
pro la manko de problem'?

Ĉiam restas la espero.

Ĉie estas ĝojo.  
Serĉu ĝin zorgeme,  
en la mond' sur ĉiu vojo  
eĉ en tiu ĉi poem'.

Tial ridu jam matene.

## Somero

Somero kun suno ĝojigas la homon.  
La homo tre ĝojas pro tiu feliĉ'.

Varmeco ebligas forlasi la jakon.  
Ni estas kontenta pri tiu kondiĉ'.

Tre grava kondiĉo por bela ferio.  
Ni kuŝas sur plaĝo en varma aer'.

Ripozo sur sablo, malstreĉa defio.  
Naĝado en akvo, agrabla afer'.

Afero danĝera por ĉiu farmisto,  
ĉar mankas la pluvo, por plantoj  
turment'.

Sekeco tro longa. Avertas fajristo.  
Ekbrulas facile la pajla tegment'.

Arbaroj jam brulas, la cervoj forfuĝas.  
Leviĝas la fumo, malhelas ĉiel'.

Danĝero por vivo, do ĉiu forkuras.  
La perdo de ĉio, eĉ de la juvel'.

Juveloj ne povas alporti la savon.  
Fajristoj batalas, batalas sen fin'.

La jetoj el akvo reduktas damaĝon.  
Pri pluvo decidus nur bona destin'.



## Yohanes Manhitu (Indonezio)



## POETINO EKVATORA

Al mi vi daŭre sendas poemojn—  
reflektaĵojn de via bela insuleto,  
kie la sunlumo ĉiam amas florojn;  
kaj, vi, poetino, iĝas revo de ulo.


En via poezio ne troviĝas neĝo,  
eĉ kiam ĝi temas pri Kristnasko.  
Jam venis al mi gusto de papajo  
inter la aromoj en fruktara poezio.

Hodiaŭ mi ricevis novan poemon  
verkitan je la pasinta seka sezono.  
Ĉiu verso spegulas vian aspekton  
bele pentritan sur lazur-kanvaso.

Tie, tie, vi estas, mia bela poetino—  
admirantino de sunlumo kaj fruktoj.  
Per vortoj, venas al mi ĉiu vitamino:  
sero verda por vivi dum mil sezonoj.

*Jogjakarto, Indonezio, 6 Februaro 2012*

## Jadranka Miric (Serbio)



## Karmemore al panjo

Ĉiu dua ino memorigas min  
pri vi, blondulino mia.  
Kreskis granda doloro perdinte vin.  
Same pro malgaja sorto via.

Kvazaŭ suno perdis brilon sian.  
Mi ebrie vagadis longe nekonscie  
tamen ne forgesante vizaĝon vian.  
Via voĉo malhelpas. Reagas mi tutalie.

Multkolora tilibrancaro  
falanta en frua aŭtuno

ploris kune kun sia foliaro,  
ĝuste kiel mi pro vi kun nia parencaro.

## Aŭtuna nebulo

Malleviĝis nebulo  
sur multkolora arbaro.  
Sur la domo de ludanta etulo,  
sur la fumotubo ĝia.

Sur la floretoj en balkono mia.  
Susuras flava tapiŝo  
sub liaj piedoj ĝemis.  
Tenere kovris ilin nebul'.

Ploris okuloj de etul'.  
Tagmeze eliris Suno  
radiis ĝis aperado de Luno .  
Magie foreforpelis ĝi  
tiun densan nebulon fi.

## Aŭtuna bonveno

Brunoruĝa falinta foliaro  
susuras sub niaj piedparo.  
De ie ekruĝiĝis matura kaŝtaneto  
frapante mian ŝupinton. Ĉarma kisetto!

Via mano en la mia.  
Ni fiere kaj feliĉe paŝadis kune  
tra ne tiom feliĉa vivo nia.  
Marŝis ni sune kaj lune.

Ĉirkaŭ mia kolo flirtis ŝalo multkolora .  
Vente salutis ĝi aŭtunon dume ni  
estis okupitaj kisante unu la alian. Ora  
sunsubiro reflektiĝis en sunokulvitroj de  
kara ci.

### Ivanichka Magharova (Bulgario)



Aŭtun'. Folifal'.  
L'arbar' ree ekdormis.

Oni blankiĝis.

Meznokta bluso  
Sur la fenestro frapas.  
Luno ĵaluzas.

Senluna nokto!  
Silento! Muziko en  
koro sonadas.

Malvarmetiĝas.  
La krizantemoj velkas.  
Tekruĉo kantas.

Neĝas! Neĝeroj  
l' teron kovras.  
Paŝoj de duona.

Etaj neĝeroj,  
mildaj aŭtunaj herold'  
La teron kisas.

Bordo dezertas.  
Nur la ondo tenere  
kisas la sablon.

### Yi Qiao (ĉino en Germanio)



## Aŭtuna nokto

Nokte de aŭtuno  
hele lumas luno.  
Jen trembrilaj steloj  
kaj deĵoraj la anĝeloj.

Dume mi fordormas,  
dolĉimagon formas.  
Nun mi vidas en la revo  
pionirojn kun sanktdevo.

Ties gloron mi komprenas,  
inspirete ĉio tuj serenas.  
Kiam estas la aŭroro,  
nova tago plenos je fervoro.

## Alma Jaku



## La Amo

Kiam vi ĵuradis, mi ne volis viajn okulojn  
Kaj milde mi demandis vin en la mallumo  
“Ĉu vi amas min tiel forte, kara?”  
Kiam vi diris “jes”, la okuloj ekŝaltis lumon.

Ni jam pasigis montojn, riverojn,  
Ni dormis en la brakoj de la amo  
Ni naskis novajn stelojn, estingis sunojn  
Nian animon ni donacis al la universo.

Vi estas mia orbrila aŭroro,  
Nova tago je Dia beno,  
Nova semo en forgesita tero,  
Dezertigita de jaro al jaro.

## Sen pento

Veni ĉe via lito mi volos  
Kiam tutloke noktigos  
Kaŝe de la mondo vin konfuzigos  
Per miaj mamoj vin nutros.

Vi suĉos la mielon per lipo  
Vi traserĉos sur la kuŝanta kolo  
Vi ekbruligos mian karbardaĵon,  
Vi enfalos tutebria sur mian korpon.

Poste mi denove foriros,  
Kaŝe, trans la nuboj, mi perdiĝos,  
Per ĉiela pluvo la pekaĵon, mi lavos,  
Sentime, neniel mi pentos.

## Arto

Mi kvazaŭ libro estas  
Kiam vi min malpeze fingrotuŝas  
Neniam solvebla libro  
Notante vi sur ĉiu folio

Ĉiam kvazaŭ pentrotolo mi estas  
Kiam vi min per fingroj kolorigas  
Multe, multe da ĉielarkoj vi bezonas  
Por ĉiu floro kiu en mia animo brilas.

Kaj se pentagramo mi fariĝos  
Per kiu ŝlosilo vi min malfermos?  
Fermu la okulojn, Ulikso, mi sireno estas  
Mi ne susuras, mi simfonio estas!

## Ne estas plu tempo

Kune eterne la Suno kaj la Luno  
Interkisiĝas ili ja sub la lumo  
Sed mi kaj vi ekde pratempoj  
Staras unu al la alia kvazaŭ ombroj

Venu, bela, al la ĉiela angulo  
Iomete ni interkisiĝu, ĉar je dio  
Iutage al eterneco kondukos nin la suno  
Kaj ni ne havos plu tempon por pento

*Elalbanigis*



**Bardhyl Selimi**

(Albanio)

## El Ĉina Antikva Poezio

Zhang Xiaoxiang (1132-1169)

## Preter Dongting-lago

—laŭ melodio *Ĉarma kantistino*

Proksime nun al l' Aŭtunmeza Festo\*  
ne blovas ajna stri' da vent'  
super la herbtapiŝ' ĉe Dongting-lago.  
Nur flosas mia boatet' sur la spegulo  
de la lagakvo vasta sub la firmament'.  
La brila luno disradias kaj la lago  
reflektas lunon, Laktan Vojon jen kun tent'.  
Lagakvo kaj l' ĉielo kunfandiĝas  
en harmonia kaj kristala splend'.

La lagpejzaĝo ravas kaj fascinas  
ekster priskrib' en evident'.

La unujara vivo mia en sudparto  
ankoraŭ restas freŝe en memor'.

Mi sola vivis ja en fremda loko,  
min akompanis nure la lunglor'.

Mi tamen tenis min glacie pura  
ĉiame kun fidela kor'.

Nun en gandaĝo mi ne povas  
rezisti l' fridan venton en nokt-hor',

mi tamen sidas firme en boato,  
flosante sur la vasta lago sen ignor'.

Mi volus fari vinon per la akvo  
de la Rivero Okcidenta, uzi stelojn por  
vintaso, kaj inviti ĉiujn kiel gastojn.

Frapante l' boatflankon mi jen kun sonor'  
de voĉo skande kantas  
pri l' bela nokto kun lunnuma la dekor'.

*\*Aŭtunmeza Festo okazas je la dekkvina de la oka  
monato laŭ ĉina lunkalendaro.*

## Printempa pejzaĝo ĉe la lago

### —laŭ melodio *Luno super okcidenta rivero*

Mi ne salutis la printemppejzaĝon ĉe la lago  
jam de tri jaroj, kaj nun mi alvenas ree.

La vento puŝas mian boateton  
al transa bordo de la lago senpanee,  
la vergoj de salikoj tie miajn vangojn  
karesas jen leĝere tree.

Mi jam kutimas al la vivo  
peniga, suferplena,  
kaj nun en pejzaĝo bela  
mi sentas min ja senĉagrena.  
Sub pavilon' la lagakvo limas  
kun la ĉiel' serena,  
jen aro da akvbirdoj flugas  
el de sabl-benke malebena.

## Remado sur Xiangjiang-rivero

### —laŭ melodio *Preludo de akva melodio*

Mi lavas al mi la piedojn

ĉe riverbordo en vespero.

La frida vento el la nordo

karesas miajn harojn kun leĝero.

Mi jam vizitis ĉiujn lokojn en la sudo,  
sed ne alvenis al Xiangjiang-rivero.

Ĉifoje mi aĉetis boateton, kaj pro  
providenco

mi havas ŝancon jen junie al ĉi tero.

Mi kvaz' cikado liberiĝus ĵus de ŝelo

jen flugas super homa mond',

kaj ankaŭ kvazaŭ papilio flirtas kun libero.

Surportas mi vestaĵon el lotusfolioj,

kaj la rubandon el eŭpatorio,

kun freŝaj floroj en la mano.

Feino el Xiangjiang-rivero, kun ridstrio

ekdancas jen en akompano de liuto,

kiu eligas tonojn de la trist-ario,

kun sent' indigna kaj fidela

el la poemoj de l' poeto\* kun pasio,

kaj kun versoj liaj kiel kantoteksto,

brilantaj eĉ per sunradio.

Senlimas ja plezuro tia, sed junuloj

eĉ ne komprenas tion kun konscio.

*\* Qu Yuan (340-278 a.K.), granda poeto kaj politikisto.*

## Xin Qiji (1140-1207)

## Distriĝo

### —laŭ melodio *Luno super okcidenta rivero*

Mi nur konas ĝojon, ridon,  
sed ne la ĉagrenon en ebrio.

Mi lasttempe venas al kompreno:

fido al antikvaj libroj ja kun pio

ne alportas utilecon jen kun beno.

Lastan nokton mi ebrie falis ĉe pinarbo,

mi demandis al ĝi: “Kion fari, do, kun

ebriulo?”

Ŝajne l' arbo volis helpi per subteno,

mi forpuŝis ĝin per mano sen plezuro,

kaj riproĉe diris: “For de mi, ne ĝenu vin

per peno!”

## Vilaĝa kabano

—laŭ melodio *Serena muziko*

Malalta kanabo kun pajla tegmento  
ĉe l' roj' borderita per verdaj herboj en  
prospero.

Ebrie mi aŭdas mildvoĉon kun loka akĉento,  
per kiu babilas blankharaj virino kaj vir' kun  
sincero.

La filo pliaĝa sarkadas eoste de l' rojo,  
Mezaĝa la viro kok-kaĝon jen plektas.  
Plej juna la filo petola kun ĝojo,  
nun lotusosemojn kolektas.

*Elĉinigris*



**Vejdo (Ĉinio)**

\*\*\*\*\*

**Yang Wanli (1127-1206)**

### Malĝojo pri printempo

Printempe mi aspiras pri multo da admiro,  
Sed ĉiufoje vanas por mi l' eost-zefiro:  
Rigardi mi ne povas la florojn paradantajn—  
Malsanas mi, aŭ restas en tristo de vespiro.

### Senokupiteco en frua somero

Umeoj al la dentoj fi-agacon nun inspiras,  
Baŝooj en fenestran la vualon verde brilas.  
La tago longas. Kiam mi vekigās el siesto,  
En la enuon kaj senintereson mi tuj sinkas;  
Kaj en ĉi senokupiteco mi spektadas, kiel  
Salikajn florokvastojn la infanoj kuratingas.

**Zhu Xi (1130 – 1200)**

### Printempa tago

Ekskuras mildan tagon mi borde de Sishui\*,  
Senlime pitoreskaj pejzaĝoj novas ĉi.  
Facile ja sentiĝas karesa vent' eosta,

Printempo milnuanca paradas per magi'  
*Sishui\**: nomo de rivero meze de la provinco  
Shandong.

**Zhang Shi (1133 - 1180)**

### Improvizita je la Printempokomenco

Ĉe jarturn' maloftas frostaj prujno kaj glacio,  
Herboj, arboj ekprintempon konas kun  
konscio,

En okuloj plenas viva viglo de naturo,  
Vento blovas la riveron en verda vario.

**Du Lei (? - 1225)**

### Frostas nokte

Frostas nokte. Min vizitas kamarado kara.  
Ruĝe flamas karboforno, teo sur ĝi bolas.  
Sama sceno: brilas sur fenestrojn luno klara,  
sed malsame: kelkaj umefloroj bonodoras.

*Elĉinigris*



**Minosun (Ĉinio)**



## Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEK-NAŬA

## Zhi la rabisto

§29-03

La Nesatigeblo demandis la Moderon:

“Ĉiu volas famon kaj profiton. Kiam iu estas riĉa,  
aliaj amase venas al li. Kiam oni amase venas al li, oni  
humiliĝas antaŭ li. Kiam oni humiliĝas antaŭ li, oni  
adoras lin. Kaj sekve li, adorata de aliaj, vivos longan  
vivon, konservos sanon kaj estos ĉiam en bona humoro.

Nun ke vi sola ne havas tian deziron, mi scivolas, ĉu la kaŭzo estas, ke al vi mankas sufiĉa inteligenteco aŭ sufiĉa kapablo? Aŭ pro tio, ke vi, volante observi la honestan moralon, rifuzas ĉion alian?”

“Trovigās tiaj homoj,” respondis la Modero, “kiuj supozas, ke ĉar ili vivas en la sama tempo kaj en la sama loko kiel iuj famuloj, ankaŭ ili mem devas esti elitaj kaj superi la vulgaran mondon. En efektiveco ili havas en la menso neniajn principojn, kiuj ilin gvidus. Ili ne povas ĝuste juĝi la antikvecon kaj la nuntempon, nek fari distingon inter la vero kaj la eraro. Ili fine konformigos sin nur al la vulgaraj konvencioj kaj ĉasos la famon kaj la profiton je la kosto de memestimo kaj eĉ de la vivo. Se juĝi laŭ iliaj vidpunktoj kaj konduto, ĉu ili ne estas tro malproksime de tio, pri kio ili parolas, nome la longviveco, la sanokonservo kaj la ĝuado de la vivo. Ili ne povas kompreni, kial la doloroj kaŭzita de aflikto kaj la plezuroj naskitaj de komforteco ambaŭ difektas ilian sanon. Ili ne povas kompreni ankaŭ, kial la timoj kaŭzita de maltrankvilo kaj la feliĉo estiĝinta de ĝojo same vundas la menson. Ili scias nur kion ili volas plenumi, sed ne scias, pro kio ili devas tiel agi. Tial, eĉ se ili estas tiel altaj kaj noblaj kiel reĝoj, ili ne povas esti liberaj de malfeliĉoj.”

La Nesatigeblo diris: “La riĉaĵoj estas neniel malutilaj al la homoj. Nek la perfekta homo, nek la virta saĝulo povas pretendi, ke li povas sate ĝui ĉiajn plezurojn kaj plene posedi la plej altan potencon. Tiu, kiu atingis riĉecon kaj aŭtoritatecon, povas trouzi la bravecon de aliaj por pligrandigi sian propran potencon, manipuli la inteligentecon de aliaj por elmontri sian prudentan juĝkapablon, kaj sin apogi sur la virto de aliaj por fari, ke aliaj laŭdegu lin kiel noblaniman kaj eminentan. Plie, li povas aspekti tiel majesta, kiel reĝo, kvankam li ne posedas sian reĝlandon; kaj estas tute nature, ke la tuta mondo scias aprezi la balajn sonojn, la ĉarmajn virinojn, la bongustajn manĝaĵojn kaj la plej superan povon. Oni ne bezonas lerni por ilin ami, nek la korpo devas sin adapti por ilin akcepti. Ĉiuj homoj scias deziri, abomeni, eviti kaj akcepti, sen bezoni esti instruita; la homa naturo sufiĉas ĉi-rilate. Neniu povas esti libera de ĉio ĉi tio, — jen mia opinio, kiun mi ne forlasus, eĉ se la tuta mondo min kondamus!”

La Modero diris: “La saĝaj homoj agas konforme

al la deziro de la popolo kaj ne agas kontraŭ ties deziro. Tial ili estas kontentaj kaj sekve konkuras pri nenio; ili volas plenumi nenion brilan kaj sekve ili havas neniajn aspirojn. La malkontenteco kondukas al la ĉasado de profito. Iuj homoj ĉasas ĉion kaj tamen ne konfesas sian avidecon. Iuj memvole rezignas sian posedon, kiam ili trovas ĝin superflua. Eĉ se ili rezignas la riĉaĵojn de la tuta mondo, ili ne konsideras sin honestaj. La honesteco aŭ la avideco ne ŝuldas sian estiĝon al la premo de ekstera forto; kontraŭe, ili devas esti ekzamenataj en la interna konscienco. Iuj povas esti tiel potencaj, kiel reĝo, sed ili ne malestimas arogante aliajn pro sia altrangeco. Iuj povas posedi ĉiujn riĉaĵojn de la tuta mondo, sed ili ne pretendas esti superaj al aliaj pro sia riĉeco. Ili rifuzas surtroniĝi, ne ĉar ili deziras per tio rikolti famon, sed ĉar ili, konsiderante ĝian negativan flankon kaj pesante la eblajn malfeliĉojn en la estonteco, rigardas ĝin kiel malutilan al sia vera naturo.

“Dum la regado de la reĝo Yao kaj la reĝo Shun, la modereco regis en la tuta mondo. La kaŭzo ne estis, ke la du suverenoj amis la popolon, sed estis, ke ili ne deziris detrui sian naturon per tro da bonaĵoj. Iam Shan Juan kaj Xu You rifuzis akcepti la tronon proponitan al ili ne pro tio, ke ili hipokrite faris ŝajnigon, sed pro tio, ke ili ne volis ruinigi sian vivon per la regado de la reĝlando. Ili elektis tion, kio estis al ili vere avantaĝa, kaj rifuzis tion, kio povus ilin malutili; kaj la tuta mondo laŭdis ilin kiel homojn saĝajn kaj kapablajn. Tian laŭdon ili meritis, ĉar ili agis tiele ne por ĉasi la famon.”

La Nesatigeblo diris: “Se iu, por konservi sian famon, trolaborigas sian korpon, rifuzas fajnajn manĝaĵojn kaj vivas sobran vivon nur por subteni sian ekzistadon, en kio do tiu estas diferenca de homo, kiu ankoraŭ spiras sed estas turmentata de longedaŭra malsano?”

La Modero diris: “La modera posedo signifas feliĉon; la superfluo estas malutila. Tio validas por ĉio, kaj nenio estas pli malutila ol la posedo de la superfluaĵ riĉaĵoj. Nuntempe, la riĉuloj plenplezure agrabligas siajn orelojn per muzikaj sonoj de sonoriloj, tamburoj kaj flutoj, kaj sate kontentigas sian tikladon de la palato per viando kaj bongusta vino. Lia avideco je plimulto



estas tiele vekita, kaj lia tasko estas forgesita. Kiel konfuzita li estas! Sekve li trovis sin en preskaŭa sufokiĝo, kvazaŭ li malfacile grimpus sur la deklivo de monto kun peza ŝarĝo sur la dorso. Kiel mizera estas por li la vivo!

“Tiu, kiu alkroĉiĝas al la riĉaĵoj, altiras al si plendojn kaj ofendojn; tiu, kiu alkroĉiĝas al la potenco, estas frakasita pro laciĝo; tiu, kiu vivas en senokupeco, dronas en avideco; tiu, kiu estas plenplena de energio, fariĝas aroganta. Kiel serioze malsana li estas!

“Tiu, kiu deziras esti riĉa kaj ĉasas riĉaĵojn, ĉiam trovas sin en nesatigebleco pri siaj posedaĵoj, kies amasiĝo jam superas la muron per sia alteco. Ju pli avida li fariĝas, des malpli eble li povas bridi sian deziradon. Kiel hontinda li estas!

“Tiu, kiu posedas amasegon da riĉaĵoj sen bezono ilin uzi, ĉiam timas ilin perdi kaj tamen rifuzas ilin forlasi. Ĉar senfina estas lia deziro je la profito, li fariĝas pli kaj pli zorgoplena kaj obsedata. Kian maltrankvilan vivon li vivas!

“Timante, ke li povos esti prirabita hejme kaj mortigita ekstere, li konstruigas ĉirkaŭ sia domo defendajn turojn kun paftruoj, kaj li neniam kuraĝas iri eksteren sola. Kian timoplenan vivon li vivas!

“La supre diritaj ses malbonoj estas la plej pereigaj. Tamen oni ofte forgesas ilin kaj ne prenas ilin en konsideron. Kiam malfeliĉo falos sur ilin, estos tute neeble al ili konservi sian vivon malgraŭ sia preteco rezigni ĉiujn siajn posedaĵojn, por retrovi nur unutan trankvilon eĉ en malriĉeco. Rezulte de tio, ili posedos nenion rilate la famon kaj la profiton. Ho, kiel malsaĝaj estas tiuj, kiuj laciĝas la menson kaj konsumas la korpon per vana ĉaso de la famo kaj la profito dum la tuta vivo!”



*Elĉinigis*



**Wang Chongfang**

(Ĉinio)

# Ĉineske

**Yi Qiao (ĉino en Germanio)**

## Kamparo

— laŭ ĉinesko *Kvazaŭsonge*\*

En la verdkamparo  
ondas flora maro.  
Ĉarma la pejzaĝ'  
vastas jen sen baro.  
Jaro, jaro  
bena por homaro.

*\*Kvazaŭsonge (ĉine: Rumengling): ĉina fiksfirma poemo el 7 versoj de 6,6,56,2,2,6 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa,a,a,a. La kvina kaj sesa versoj estas samaj.*

## Verda flago

— laŭ ĉinesko *Monta kratago*\*

Ardo en la kor'  
sur voj' de vago.  
Plene de esper'  
sub verda flago.

Pompas samide'  
kun belimago.  
Estos morgaŭ ja  
pli bona tago.

*\*Monta kratago (ĉine: Shengzhazi): ĉina fiksfirma poemo el du samaj strofoj kun po kvar versoj de 55,55 silaboj, laŭrimaranĝo xa,xa (x=senrima)*

## Kvar sezonoj

— laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo*\*

Printempe  
freŝas ĉiu tag'.  
Salikoj jam burĝonas,  
naĝas anasoj sur lag' —  
novjara imag'.

Somere  
verdas la kampar'.  
La vivo ĉie viglas,  
ondas vaste la flormar',  
fervoras sen bar'.

Aŭtune  
oras landa scen',  
rikoltoj riĉatingas.  
Luno helas jen kun ben'  
por kora seren'.

En vintro  
falas blanka neĝ'.  
Junuloj ŝatas skii,  
ĝoje krias ĉe mont-eĝ',  
jubilas kun preĝ'.

## Jadranka Miric (Serbio)

*Luno okulsignis al mi*

— laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo*\*

Bluas Lun',  
ĉiela flavul'  
Ridas kaŝe vaganto.  
Kia mistera bonul'  
al ĉiu servul'.

Vagadas  
tiel nia Lun'  
tra senfina nubaro.  
Ŝanĝas ĝi lokon de Sun' !  
Eĉ formon de Lun'!

Vidas ĝi  
ĉies suferojn,  
ĉies vivoproblemojn,  
ĉies fi kruelaĵojn  
ĉies laborojn.

Ofte ĝi  
ĉiĉerone nin  
gvidas tra malluma Mond',

farante magion. Ĝin  
vidos sur la pin'.  
Stelaro  
ĉeestas ĝue  
kun ĝi tremblanta brile.  
Mi volus danci kune  
kun vi, ĉi nokte.



## HOMOJ KAJ NATURO

— laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo*\*

Aŭtune  
tre varmas tagoj.  
Nokte tre ŝanĝiĝas.  
Do, en fruaj matenoj  
falas nebuloj.

Aŭtune  
vento tenere  
svingas arbfoliaron.  
Estas multaj surtere.  
Dancas leĝere .

Komence  
de aŭtuno sun'  
ankaŭ arde radias.  
Ekis fi naturpuno.  
Ŝtormega tajfuno.

Inundoj  
endangêrigis  
homaron samkiel  
malsato. Ve, pereas  
homoj sed militas.

Dolore  
ve, krias la kor'.  
Mondo fi freneziĝis.  
Nur falsa aĉa valor'  
fi brilas ol or' .

*\*Sopir-al-sudo (ĉine:yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

## Luiza CAROL (Israelo)

# La ringoleporoj

Hieraŭ oni festis la duan naskiĝtagon de mia nepino, la filino de mia filino Flora. Oni invitis ŝiajn gekuzojn kaj geamiketojn. Entute ses geinfanoj inter 2 kaj 5 jaraĝaj ludis kune sur la tapiŝo kaj ĝuis la hieraŭan eventon.

Flora, mia filino, preparis kelkajn surprizojn por la infanoj. Unu el la surprizoj estis ses boligitaj terpomoj, metitajn cirkle sur rondan pledon. Flora skulptis la terpomojn laŭ formoj de leporoj, kun verdaj rondaj okuloj el pizo kaj etaj muzeloj el olivoj. Ĉiu terpoma leporo havis sur la verto po unu solan longan oreleon el folio de pureo, kaj ĉirkaŭ la radiko de ĉiu orelo troviĝis verda ringo el kukumo. Sed la plej mirinda fakto estis tio, ke ĉiu terpoma leporo kurbis sian solan oreleon maldekstren kaj enpikis ĝian pinton en la dekstran parton de la orelradiko de sia maldekstra kunulo. Tiamaniere, ĉe la unua rigardo ŝajnis, ke ĉiu leporo havus po 2 orelojn, kvankam sur la pledo troviĝis entute ses leporoj kaj ses lepororeloj.

Jen granda mirindaĵo, kiu emociigis la infanojn kaj ricevis laŭdojn de la plenkreskuloj. Sed verŝajne neniu sentis tiom fortan emociion kiel mi. Mia koro ekbatis forte kiam mi demandis:

— Flora, de kie venis al vi tiu ideo?

— Mi tute ne scias — ŝi respondis.

— Ĉu vi vidis foje ion similan? Ĉu vi eble sonĝis ion similan?

— Mi tute ne scias — ŝi ripetis.

La gastoj arigiĝis ĉirkaŭ la pledo kaj komentis laŭte, dum en mian memoron revenis la plej stranga sonĝo de mia ĝisnuna vivo. Ĝi okazis pli ol tridek jarojn antaŭe, sed mi rememoras ĝin tiom klare kaj detale, kvazaŭ nur hieraŭ mi travivis ĝin...

\*\*\*

Ofte mi demandis min, ĉu entute temis pri sonĝo,

aŭ eble pri unu el tiuj strangaj fabeloj, kiujn Flora kaj mi elpensadis ĉiuvespere antaŭ enlitiĝo, kiam ŝi estis infano. Verdire, ni ambaŭ havis kelkfoje sonĝojn influitajn de niaj fabeloj... kaj aliflanke niaj sonĝoj influis novajn fabelojn, tiel ke ni facile povis konfuziĝi...

Tiutempe ni loĝis en Rumanio, dum la griza historia epoko de "Sekuritate". Mankis varmo en la domoj, apenaŭ troviĝis manĝaĵoj en vendejoj, la homoj vivis en ĉiutaga vivminaco... Tiam multaj homoj malaperis subite, ĉar oni arestis ilin pro imagitaj kulpoj kaj turmentis ilin en prizonoj. Iliaj najbaroj kaj konatuloj eĉ ne kuraĝis demandi kie troviĝas la malaperintoj. Multaj homoj riskis siajn vivojn provante fuĝi eksterlanden. Kelkfoje la limgardistoj mortigis tiujn ĉe la landlimo. Tamen, multaj sukcesis elmigri kaj kreskigi siajn infanojn en pli normala etoso, en foraj landoj.

En tiu tempo mi estis juna kaj senedziĝinta. La patro de Flora forlasis min por alia virino, kaj ne plu interesiĝis pri mi kaj la infano. Mi estis infanĝardenisto en Bukareŝto kaj alportis mian filinon ĉiutage al la infanĝardeno kie mi laboris. Flora kutimiĝis pri tio, ke mi estas samtempe ŝia patrino kaj ŝia infanĝardenisto. Ŝi iel komprenis, ke mi amas ĉiujn infanojn, tamen neniun tiom multe kiel ŝin. Ŝi sciis ke vespere, kiam ni revenas hejmen, mi apartenas nur al ŝi. Kaj tiam, en nia eta ĉambro, ni elpensis fabelojn kaj sonĝojn nur por ni mem...

Flora estis 6 jaraĝa kiam oni mortigis la fi-diktatoron de Rumanio, kaj finiĝis tiu malbela paĝo en la historio de Eŭropo. Ŝi apenaŭ rememoras ion ajn pri tiu periodo. Ĉu ŝi tamen rememoras... la ringo-leporojn? Ĉu?...

Jes, iun vesperon vizitis nin kelkaj unuorelaj ringoleporoj, kiuj transdonis al mi nekutiman leteron. Ĝi estis fakte propono de elmigro por mi kaj Flora. Sed ne temis pri alia lando. Temis pri alia dimensio. La ringoleporoj kapablis translokigi nin en paralelan universon. Kiam ili kunigis siajn orelojn, ili realigis inter si iun rondan energikampon, ene de kiu ili povis kunporti homojn kaj aĵojn. La letero parolis pri iu genetikon kodon, kiun la leporoj manipulis laŭinstinke, sed tiun frazon mi ne komprenis. Ĉiukaze la letero

vaporiĝis, dum la leporoj atendis mian reagon. Mi havis konfuzajn sentojn. Mi ja estis dezirinta elmigri se eblus, sed al alia lando, certe ne al alia universo... Mi pensis: “Mi certe sonĝas. Kaj en sonĝo nenio tro grava povas okazi. Kial mi ne akceptu la proponon?”

Mi prenis mian filinon en la brakoj kaj la leporoj ĉirkaŭis nin. Ili kunigis siajn orelojn kaj... en kelkaj sekundoj ni troviĝis en alia mondo, kie atendis nin juna ĉiĉeronino. Laŭ ties klarigoj ni komprenis, ke ni estis sur paralela terglobo, kaj ene de ĝi en paralela Eŭropo, kaj ene de ĝi en paralela Rumanio, kaj ene de ĝi en paralela urbo Bukareŝto.

La konstruaĵoj similis, la parkoj similis, la malnovaj tramoj similis. Nur la homoj malsimilis. La homoj de tiu universo kapablis manipuli genetikajn kodojn, tial ili ĉiuj trapasis simplajn genetikajn operaciojn, kiuj malpliigis draste siajn egoismojn. Fakte, ĉiuj senescepte kapablis ami ĉiujn aliajn tiom multe kiel sin mem. Jen ĉio. En tiu paralela Bukareŝto, la homoj estis same malriĉaj, sed ili kundividis siajn propraĵojn egale. Neniu estis pli malriĉa ol siaj najbaroj. La tramoj kaj busoj estis same malnovaj kaj primitivaj. Sed neniu havis sian privatan aŭton. Ene de la malnovaj tramoj, la homoj helpis unujn la aliajn, neniam forpuŝiĝis, neniam sakris, ĉiam protektis maljunulojn, infanojn, gravedajn virinojn... La ĉiĉeronino parolis pri tre simplaj robotoj, kiuj aŭtomate parigas virojn kaj virinojn. Neniu geedziĝo fiaskis, neniu paro perfidis la geedzan ĵuron. La malnovaj preĝejoj estis malfermitaj tage kaj nokte. La homoj eniris tien ofte, dankante al Dio pro siaj senpekaj vivoj. Ili ne bezonis predikojn, ne bezonis konfesi ion ajn, fakte eĉ ne bezonis pastrojn. Ili nur dankis al Dio pro la vivo, dankis ankaŭ pro la morto, kiun ili ne timis. Manipulante genetikajn kodojn, ili jam sukcesis kuraci ajnajn fizikajn dolorojn. Tial malsanoj ne terurigis ilin. Morto signifis por ili nuran translokiĝon en novan nekonatan dimension, eble malpli enua ol tiu en kiu ili vivis. Ili ne tro bedaŭris la mortojn de siaj familianoj, ĉar ĉiukaze ili amis ĉiujn homojn egale samkiel sin mem, do ne aparte gravis kiu el ili ĵus forlasis la vivon. La artoj malprosperis kaj estis malaperantaj. Ja neniu spertis aliajn emociojn krom la egala amo por ĉiuj. Pri kio do parolu la poemoj? Pri kio oni komponu kantojn?

La teatroj kaj koncertsalonoj aliformiĝis en grandaj restoracioj, ĉar nur la kuirado prosperis el ĉiuj artoj. La homoj ŝatis kunmanĝi kaj dume kunbabilu. Pri kio ili babilis? Samkiel en nia paralela Bukareŝto: pri elmigrado. Ĉiuj revis elmigri el tiu enua vivo. Sed kien? Kiel? Eblis elmigri nur pere de interkonsento, kiam oni trovis anstataŭiganton el alia dimensio kaj oni interŝanĝis la lokojn.

La ĉiĉeronino kondukis nin al unu el la infanĝardenoj de la urbo. Ĝi similis nian infanĝardenon, sed estis pli granda. Ĝi havis multajn dormoĉambrojn, ĉar la infanoj kutimis tranokti tie. Ili amis la infanĝardenistojn samkiel siajn gepatrojn, do ili ne sopiris reveni hejmen. Fakte ili sopiris pri nenio. Ili emociiĝis pri nenio. Ili kunludis trankvile, sen kvereloj, sen larmoj, sen krioj.

Unu el la knabinoj similis mian filinon. Ŝi rigardis nin scivole, senemocie.

—Tiu ĉi estas mia filino — diris la ĉiĉeronino senemocie. Subite mi ekkonsciis, ke la ĉiĉeronino similis min okulfrape, kvazaŭ ŝi estis mia imago en spegulo. La konstato ŝokis min, ektimigis min. Mi prenis la manon de Flora. Ŝi tremis, ŝia korpo algluiĝis al la mia kaj ŝi flustris:

— Mi volas iri hejmen, panjo...

La ĉiĉeronino rigardis rekte en miajn okulojn kaj demandis:

— Ĉu vi kaj via filino volus interŝanĝi la vivojn kun ni? Ĉu vi pretus vivi ĉi tie anstataŭ ni?

— Mi volas hejmen...—ripetis Flora.

Mi rifuzis la proponon de la ĉiĉeronino rapide, senhezite.

Kaj la sonĝo finiĝis.

Ĉu ĝi estis sonĝo?



Eldonas Redakcio de *Penseo*  
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)  
Retadreso: [vejdo@163.com](mailto:vejdo@163.com)  
[www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm](http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm)

